

LA FANTOMOJ DE LA LAGO

Resumo

Enkonduko.....	3
La Olda Ŝipo.....	4
La Du Amikoj.....	8
La Blanka Ĉevalo.....	11
La Blanka Kruco.....	15
La Granda Ursino.....	19
Verkintoj.....	23

Enkonduko

La Fantomo de la Lago estas kolektiva realigo de la membroj de la Laŭzana Societo de Esperanto.

Temas pri po 5 tekstoj verkitaj de 15 homoj en diversaj ordoj.

La paragrafo unu el ĉiu rakonto samas, do ĝi ne repetos.

Paragrafo unu

- tiel komenciĝas tiu terura rakonto. Amiko mia, kiu loĝas en Kanado, decidas ferii en nia regiono kun sia edzino. Li sendas al mi leteron por informi min pri la datoj de sia vojaĝo. Mi do respondas al li, ke mi ĝojas revidi lin kaj lian edzinon. «Mi iros en la flughavenon por bonvenigi vin.» Mi notas lian alventagon kaj horaron en mian agendon: «Dum miaj libertagoj mi plezure vizitigos vidindaĵojn de nia regiono.» En la letero li parolas al mi pri restoracio apud la lago sude de mia urbo, kiun li absolute volas koni. Kial “absolute” ... mi ne vere komprenas kial. Ĉu estas specialaĵoj por manĝi tie? Mi decidas atendi renkonti lin kaj esti vidalvide de li por ricevi pli da klarigoj.

La Olda Ŝipo

Alineo 1.

«Iam...»

Alineo 2.

Do, la antaŭviditan daton, mi alvenas al la flughaveno kaj atendas lian aviadilon. Tiun tagon pluvegas kaj ventegas. Mi vidas, ke la aviadilo balanciĝas antaŭ tuŝi teren. Estas iomete angore, sed la piloto tre bone estras la stiradon kaj la flugmaŝino trankvile haltas antaŭ la alvendo.

Kelkminutojn pli malfrue mi renkontas mian amikan paron. Li mem estas ankoraŭ tre pala pro sia timo dum la vojaĝo. Sed lia edzino estas ridanta.

Ni veturas hejmen kaj survoje li rakontas al mi, ke li legis en esotera gazeto novaĵon pri strangaj aperaĵoj apud aŭ en nia lago. La paro ĝojus viziti tiun lagon kaj tute konsentas malkovri samtempe niajn bonajn specialaĵojn. Sed li ankaŭ esperas ricevi klarigojn pri tiu mistero.

Alineo 3.

Tiun historion mi svage aŭdis sed mi kredas, ke temas pri artikolo de ŝercemulo. Dum la veturado mia amiko rakontas, ke troviĝas restoracio borde de la lago Lemano, en kiu iam oni vidis ion, iun aĵon misteran. Feliĉe li kunprenis la gazeton en sia valizo. Do mi promesas helpi lin partopreni en tiu esplorado, ĉar mi havas kelkajn liberajn tagojn.

Mi pensas, ke la sekvantaj horoj promesas esti pasiaj. Mi ĝojas legi tiun artikolon, kiu intrigas min. Ankaŭ min interesas misteroj. Do, ni alvenas hejmen. Mi instalas miajn amikojn komforte. «Ripozu momenton», mi diras al ili, «dum mi preparas trinkaĵojn kaj kukon. Poste ni povos diskuti kaj fari planon por la venontaj tagoj.»

Alineo 4.

Pli poste ni retrovas nin en mia manĝoĉambro. Mia amiko alportas la esoteran gazeton kaj tuj mi legas la artikolon. La verkinto parolas pri iu sovaĝa loko inter Ĝenevo kaj Laŭzano, kie troviĝas izolita restoracio, ĝuste borde de la lago. Tie eblas manĝi specialaĵojn kaj ĝui mirindan vidon al la Lemana akvoj. La artikolo pluiras tiel: «Kiam la klientoj tage sidas ene, ĉio normalas, sed nokte kelkaj rakontas strangajn fenomenojn. Ili povas vidi fosforeskajn neklarigeblajn lumetojn aperi kaj malaperi super la akvo. Ifoje, ĉefe kiam la luno plenas, iuj klientoj rimarkis nedifinitajn grizajn formojn, kiuj ŝajnis danci sur la lago kaj subite plonĝi en la akvon.» La aŭtoro de la artikolo aŭdis pri tiuj rumoroj, sed li mem tute ne iris al tiu loko; li nur disvolvis fantaziegajn hipotezojn. Mi diskrete ridetas post tiu legado.

Alineo 5.

Miaj amikoj diras, ke ili volas iri dormi, ĉar la hordiferenco komencas sentiĝi. Mi deziras bonan ripozon al ili kaj anoncas la matenmanĝon por la naŭa.

Mi iras al mia komputilo kaj rete serĉas pri “fenomeno sur la Lemana lago.” Mi nenion trovas kaj neniu retloko havas tekston pri strangaj aperaĵoj. Enreteje nur aperas la referencoj de la gazeta artikolo, kiun mi ĵus legis, nenio pli. Eble serĉante pri “restoracioj” mi trovos klarigojn. Nur ok situas en tiu regiono, el kiuj du staras borde de la lago. Plie mi malkovras en “Buchillon” kabanon apartenantan al klubo de maristoj nomita “La Olda Ŝipo”, en kiu dufoje semajne oni proponas specialan manĝon por “observi aperaĵojn sur la lago”. Bizara invito.

Alineo 6.

Nun miaj palpebroj faletas kaj mi decidas enlitiĝi. La dormo ne alvenas. Mi turnas kaj returnas min enlite batalante kontraŭ ideaĉoj, kiuj eniras mian kapon. Kial? Ĉu eblas? Ĉu miaj amikoj serĉas esoterajn eksperimentojn? Mi enketos morgaŭ. Mi ektimas koŝmari... inkubsonĝi pri eksterteranoj. Finfine mi endormiĝas.

Mi vekigās, kiam la suno enĉiele fajriĝas. Mi pensas: «Belega tago en perspektivo». Mi pensas, ke miaj amikoj ankoraŭ dormas; mi nenion aŭdas. Nur iuj birdkantoj perfidas la silenton. Atendante mi surtabligas matenmanĝaĵojn por ĉiuj. Subite sonoras la telefono. Mia edzino informas min, ke ŝi reheimeniĝos postmorgaŭ; de tri tagoj ŝi vizitas sian maljunan patrinnon en Valezo.

Alineo 7.

Ŝi demandas al mi: «Diru, kara mia, ĉu alvenis viaj amikoj senprobleme? Mi aŭdis, ke oni fermis la flughavenon hieraŭ dum pluraj horoj, kaŭze de ventegoj.» Mi tuj trankviligas ŝin: «Ne zorgu, ĉio disvolviĝis bone kaj normale. Kaj mi eĉ sukcesis prepari manĝaĵon por ni ĉiuj.» Ŝi gratulas min, ĉar ŝi scias, ke mi ne estas fama kuiristo. Mi demandas novaĵojn pri ŝia patrino. Ŝi konfirmas al mi, ke ĉiuj ĉe ŝi bonfartas kaj ke ŝi ankaŭ vizitos sian fraton ĉi-posttagmeze. «Salutu ĉiujn de mi kaj transdonu al via patrino miajn bondezirojn. Ho, pardonu, kara mia, mi aŭdis niajn gastojn alveni. Mi vin alvokos pli poste ... Kisoj ... Ho kara ... ho ...» Tro malfrue. Ŝi jam rompis la komunikadon. Mi turnas min por bonvenigi miajn amikojn.

Alineo 8.

«Bonan matenon. Ĉu vi bone dormis?» «Jes, dankon» respondas Mario, kiu samtempe rigardas strangmaniere sian edzinon, kiu diras: «Fakte Mario ne ĉion diris al vi hieraŭ vespere. Delonge li membras en esotera klubo kebeka. Antaŭ du monatoj li ricevis leteron, en kiu kuŝis tiu gazeto... kun manskribita adreso, situata en Svislando kaj bizara kodo.» Mario daŭrigas: «Jen tiu papero. Tiu letero estis sendita de la notario de Stefano, samkluba amiko, kun kiu mi ofte parolis pri strangaj fenomenoj; li tial multe ŝatis vojaĝi enmondo. Antaŭ tri monatoj Stefano memmortige malaperis en Kebekia rivero.» Liza klarigas: «Stefano havis neniun kialon sinmortigi». Mi legas la surpaperan adreson, tiun de la kabano de maristoj "La Olda Ŝipo", kiu situas en Buchillon. Sur la papero aperas ankaŭ kodo el ses ciferoj kaj literoj.

Alineo 9.

Mi decidas proponi pli profundiĝi perrete kaj enketi pri "La Olda Ŝipo". Ni malkovras, ke antaŭ kelkaj jarcentoj la vilaĝo "Buchillon" nomiĝis "Chanivaz". Tiuepoke la centoj de loĝantoj metiis kiel kamparanoj, fiŝistoj kaj vitokultivistoj. La historiista teksto rakontas, ke iam tri fratinoj estis arestitaj kiel sorĉistinoj. Oni diras, ke kutime en lunplenaj noktoj borde de la lago la virinoj dancante ĉirkaŭ fajro kaj kantante en fremda lingvo bruligis kadavrojn de ratoj. La eklezio kondamnis ilin esti ŝtiparumitaj meze de la "Chamblard"-arbareto. La legendo diras, ke nun la triopo revenas surstrande timigi la vilaĝanojn per bruoj hororaj. Depost kelkaj jaroj la maristoj organizas kradr-ostaĵojn por nombraj mistikuloj, kiuj esperas vidi la "fantominojn".

Alineo 10.

Liza tuj proponas telefoni por rezervi vesperon en tiu marista kabano. Mario hezitas: «Ĉu vi ne timas? Ĉu vi pensas, ke ne danĝeras?» Lia edzino respondas: «Se Stefano donis tiun adreson por vi, mi pensas, ke li deziris, ke vi iru al ĝi, ĉu ne?» rigardante min. Mi nenion diras, krom: «La telefonnumero facile troveblas ... do simplas ... ĉu jes aŭ ne? ... voku ilin». Liza konvinkas sian edzon jes. Li do entajpas la numeron kaj enŝaltas la laŭtparolilon por aŭdigi la konversacion al ni. Raŭka voĉo respondas: «Ĉivespere ... jes eblas ... venu je la naŭa ... kiom da plenkreskuloj, ĉar infanoj ne estas akceptataj ... tri ... do bone ... ĉu vi havas kodon?» Mario, surprizita, legas: «J4X2E6». Kvinfoje la voĉo ripetas: «Do bone ... do bone» kaj elŝaltas la komunikon.

Alineo 11.

Kiam ni alvenas proksime de la lago, belega sunsubiro ruĝiĝante bonvenigas nin. Apud la marista kabano silente ĉeestas geviroj tre strange vestitaj, iliaj brakoj levitaj, rigardante la ĉielon. Alproksimiĝas malgranda maristo kun okulbendo. Li salutas nin malvarme. Mi rekonas la raŭkan voĉon. La pirato kondukas nin al rezervita bareltablo. Apud ni ĉeestas paro, la virino preĝas kaj la viro aspektas iomete nervoza. Tiu najbaro tenas enmane kuniklan piedon, certe kiel bonŝancaĵon. La nokto alvenas kaj unu el la maristoj alportas unu kandelon sur ĉiun tablon, glasojn kaj botelon da blanka vino regiona. Tiumomente la laŭtparolilo anoncas: «Kio ajn okazos, ne moviĝu, restu trankvile sidantaj je via tablo.»

Alineo 12.

Influitaj de la stranga etoso, tute silente ni levas niajn glasojn dirante tre tre malaŭte «Je via sano». Mi rekonas nian lokan sekan kaj iomete akran vinon. La menukarto surtabla klarigas, ke estas nur unu menuo por ĉiuj: «Rataj rostaĵoj kun ĝina saŭco kaj satanaj legomoj». Tiumomente ekaŭdeblas drama muziko. Du novaj gastoj alvenas, kiuj, kiel ni, ŝajnas ne esti kutimaj gastoj tie kaj ni rimarkas, ke ankaŭ ili estas ĝenataj de la stranga etoso. Ni ne plu riskas kunparoli kiam, fine de la muziko, alvenas viro, nigre vestita kaj portanta bulĉapelon: «Ĉiu el vi ĉeestas por vivi ĉivespere strangajn momentojn kun aperaĵoj, kiel vi neniam vidis antaŭe. Ĉu vi sentas, ke la tri ŝorcistinoj promenadas apude?» Li tiam vokas: «Venu fantominoj de la lago, ni pretas.»

Alineo 13.

Mistika muziko rekomenciĝas; nebulo lagsurfacen alvenas el la profundo. Aperas el la blanka nuboj tri inaj formoj, kiuj rondodancas tenante sin permane. Ni perfekte povas vidi de nia loko iliajn vizaĝojn senesprimajn, la buŝon fermitan, iliajn okulojn ĵetantajn fajron kaj la nazon, kiu forpelas fumon. La odoraĉo de “rostitaj ratoj” tutloken invadas. Pli kaj pli la muziko mallaŭtiĝas; aŭdeblas ploroj kaj plendoj. La luno supreniras en la ĉielo kaj, unu post la aliaj, la “fantominoj” alproksimiĝas ĝis la bordo de la lago. Subite malvarma vento blovas inter la spektantoj, kiuj forte reagas; virino eĉ krias kaj svenas. Tuj la kreaĵoj malaperas magie kaj ĉiuj restas ŝtonigitaj. La silento daŭras longe, ĝis kiam unu viro ekaplaŭdas sekvata de kelkaj aliaj.

Alineo 14.

Ĉiuj pli kaj pli revenas al la realo kaj ankaŭ aplaŭdas laŭte. Tiumomente la kelneroj alportas la telerojn, en kiuj kuŝas peco da rostita kuniklokruro akompanita de nedifinitaj legomoj. Vesperfine la pirato, sen sia okulbendo, alportas al ni tri brandojn avertante: «Atentu ĝi altas je naŭdek gradoj.» Li fiksrigardas mian amikon: «Ĉu estas vi Sinjoro Mario el Kebekio?» Tutmirinde mia amiko kapjesas. La maristo daŭrigas: «Mi havas leteron por vi.» Mario hezitante prenas kaj rigardas ĝin longe. Li malrapide malfermas la koverton, sur kiu estas skribite: “Por Mario zorge de la “maristoj de La Olda Ŝipo”. Mario komencas eltiri kaj malfaldi la leterpaperon. Pli li legas pli la larmoj glitas el liaj okuloj al liaj vangoj. Ni restas paralizitaj.

Alineo 15.

La ŝipisto rompas la silenton: «Stefano estis kutimulo de niaj eventoj kaj ega amiko de ĉiuj ĉitie. Li mem organizis la enscenigon de tiu vespero.» Mario komencas la legadon: «Kara Amiko. Mi feliĉas, ke vi venis malkovri nian fantoman spektaklon en Svislando. De longe mi esperis inviti vin spekti ĝin. Bedaŭrinde la destino decidis alimaniere. Antaŭ du monatoj mia kuracisto malkovris tre gravan... mortigan malsanon dorsan neresanigeblan, kiu eg...ege dolorigas min eĉ kun analgezikoj. La doktoro anoncis al mi, ke post iom da tempo mi devos sidi en rulŝeĝo. Mia vivo ne plu estas vivebla. Mi decidis foriri al la alia mondo antaŭ infero. Mi petas al vi pardonon pri mia ago. Mi scias, ke el la transmondo mi certe konservos esoteran kontakton kun vi. Via amiko por ĉiam. Stefano. PS: Vivu la Fantomoj de la Lago.»

La Du Amikoj

Alineo 1.

«lam» -

Alineo 2.

Du tagojn poste en dua letero mia amiko diras, ke li plezuriĝas pri sia vojaĝo sed ankaŭ skribas, ke iu stranga sento invadas lin kaj bizara forto puŝas lin veni svislanden. Mi ne konis mian amikon tiel mistera kaj timemeta.

Mi kalkulas, ke nun horas en Kanado la tria posttagmeze. Mi do tuj decidas telefone alvoki lin por kompreni, kia sento enigas lin. Li respondas al mi kiel kutime per ĝoja voĉo. Mi demandas lin, kiel li fartas kaj klarigas, ke mi ĵus ricevis lian leteron. Li ridas dirante, ke profesie estas momentoj malfacilaj por li, ke li tre lacas kaj bezonas tiujn feriojn en mia lando. Fine de la telefonvoko mi mem sentas min bizara.

Alineo 3.

Kial? Mi tute ne scias sed nun estas pli bone atendi ilian alvenon. Du semajnoj poste mi estas en la flughaveno por bonvenigi la paron. Mi nur unufoje vidis la edzinon de mia amiko, Julia, kiam mi vojaĝis en Kanado. Kiam mi ekvidas ilin iomete lacaj sed ridetantaj mia koro vere ĝojas. Ni brakumas nin kaj ridas senĉese. Veturile mi kondukas ilin al mia hejmo, kie ili povas ĝui privatan ĉambron. Mi preparas por ili bonan varman manĝon. Ĉe tablo ni povas finfine paroli pri la restoracio, kiu multe interesas Maksimon. Li klarigas al mi: «Antaŭ tri monatoj malaperis en Svislando mia amiko Ernesto. Li dumferie loĝis ĉe amiko. Tiam okazis stranga dramo.» Li haltas momenton tre emocia.

Alineo 4.

Postminute li daŭrigas dirante: «La historio aperis en ĉiuj montrealaj gazetoj, kiuj rakontis la aferon. La nokto alproksimiĝis sur la nigra lago, kie velveturis malgranda barko. Tri personoj ĉeestis enŝipe, Ernesto kun geviroj el liaj kunuloj. Alvenis el Ĝenevo granda tempesto kun tondroj kaj fulmoj. La virino blanke vestita kriis tre laŭte. Oni ankaŭ povis aŭdi la raŭkan voĉon de la alia viro, kiu tre koleris. La tri ŝipanoj certe ne rimarkis la tre malbonan veteron alvenantan. La luno ĵetis iomete da lumo sur la lago. Iuj observis la scenon de la strando. La ondoj pli kaj pli grandiĝis. Post kelkaj minutoj la krioj malaperis en la bruo de la tondroj.»

Alineo 5.

Maksimo aldonas: «La polico venis ŝipe serĉadi kun grandaj lumĵetiloj dum du aŭ tri tagoj. La policistoj neniam trovis la korpojn de la tri malŝanculoj. Unu semajnon poste reaperis la barko ... malplena. Mi legis enrete, ke rapide en la regiono naskiĝis legendo pri tiu dramo. Eĉ plaĝa trinkejo bazigas sian propagandon anoncante: «Venu trinki ion en nian drinkejon kaj eble vi bonŝanĉos vidi la fantomojn de la lago.» Male la estro de la apuda restoracio "Ĉe La Du Amikoj" furiozas pri tiu propagando malsana. Tamen li devas konfesi, ke multaj klientoj venas manĝi nur esperante aŭdi la raŭkan voĉon de la hantuloj.»

Post longa silento Julia diras, ke estus agrable por Maksimo iri surloken kaj manĝi kune "Ĉe La Du Amikoj". Mi ne plu scias, kion pensi.

Alineo 6.

Strangas al mi, ke tiu dramo povas krei tielajn fantaziaĵojn. Mi konfesas, ke mi dubegas, ĉu iu, io ajn povus aperi surlage. Tiu ideo forestas de mia raciema pensmaniero. Tamen mi perrete rezervas tablon por la samtaga vespermanĝo "Ĉe La Du Amikoj".

Posttagfine ni promenadas borde de la lago; mi klarigas al ili la historian dramon veran de la cunamo en la jaro 563 ... kiam la ondmuro je 8 metroj alte trairis la lagon ĝis Ĝenevo.

Mi proponas lui barkon. Trankvile remante ni silente pensas al la tri dronitoj kiel por forturni la sorton kaj desorĉi la lagon.

Ni preterpasas la drinkejon antaŭ eniri la restoracion. Ni mendas tablon apud la fenestro. En la menuo: "melono, famaj perkfiletoj kaj sorbeto." Postmomente la ĉielo nigriĝas; fulmotondro aŭdiĝas. La atmosfero fariĝas pli kaj pli etosdrama.

Alineo 7.

«Amikoj miaj, ŝajnas al mi, ke la ĉielo preparas fulmojn similajn al tiuj de via rakonto», mi diras. «Nekredeble», aldonas duonvoĉe Maksimo videble impresita. «Bonŝance ni ne plu estas en la barko», aldonas Julia. Mi bone konas la lagon. Somere fulmoj kun tondroj ofte okazas sed tiel fortajn, mi vere neniam vidis. La vento pli kaj pli fortiĝas kaj la lumturo, kiu avertas la ŝipojn pri danĝero, ĵus ŝanĝas kaj rapidigas sian ritmon. Mi informas miajn kunulojn: «Vidu, tiu ritmo de la lumturo signifas danĝeregon. Ĉiuj lagveturiloj devas rapidege enveni al la plej proksima haveno.» Vesperfine pluraj el la klientoj forlasas sian tablon por deverande rigardi la spektaklon de la furioza lago. Subite fulmotondras tiel forte, ke la domo tremas samtempe, kiam subite la lampoj estingiĝis en la tuta restoracio.

Alineo 8.

Kaj ĉiuj silentas. Oni povus aŭdi flugi muŝon. La restoraciestro alvenas veranden dirante al la maltrankvilaj klientoj: «Ne timu. Tio okazas kelkfoje kaj tio tute ne gravas.» Sed la homoj ne trankviliĝas ĉar la vento blovegas pli kaj pli. Multnombraj anoncas: «Ni foriru rapide antaŭ la pluvego.» La salono komplete malpleniĝas kaj nur restas ene Maksimo, Julia kaj mi. Ni ne plu scias, kion diri. En peza silento la restoraciestro alportas kandelojn surtablen. Ĉi-minute la poŝtelefono de Maksimo sonoras kaj ĉiu el ni tuj eksaltas. Li momentete hezitas kaj respondas malaŭte: «Jes?» La laŭtparolilo aŭdigas la viran voĉon: «Saluton Maksimo. Ĉu vi scias, kiu mi estas?» Neniu rekonas la parolanton: «Vere, ĉu vi ne rekonas min?» La silento tre ... tre pezas.

Alineo 9.

La voĉo estas malakuta sed laŭta. Ĝi ne estas niaregiona voĉo, eĉ eksterlanda akĉento. Maksimo ŝajnas rekoni la voĉon sed ne plu scias, al kiu ĝi apartenas. «Mi nomiĝas Arturo, ĉu vi ne plu rememoras pri mi? Mi estas amiko de Ernesto kaj ni ambaŭ konatiĝis, kiam mi venis ĉe li en Kanado antaŭ kvar jaroj. Ni tri, kun via fratino, iris al la koncerto de la Gaŭĉoj Pimpaj. Ĉu nun vi rememoras?» Tuj Maksimo respondas: «Ho jes, pardonu ... sed kiel vi scias, ke mi ĉeestas en Svislando?» «Via fratino telefonis al mi dirante, ke vi enketas pri la dramo. Ŝi proponis al mi kontakti kaj helpi vin por viaj serĉoj. Kiam la dramo okazis, Ernesto loĝis miahejme. Lia malapero doloris min multe. Li kaj mi ĵus partoprenis la Ĵazan Festivalon kaj li malaperis samvespere.»

Alineo 10.

«Venu kafumi miahejmen morgaŭ je la 14-a», proponas Arturo. Maksimo petas nian konsenton kaj respondas al Arturo: «Plezure. Ni trioje venos. Ĝis baldaŭ.» La morgaŭon ni ricevas perSMS-e la adreson de Arturo ne fore de la restoracio. Nia gasto ofertas al ni trinkaĵojn kaj komencas diri: «Mi pensas, ke Ernesto ne malaperis akcidente.» Ĉiuj, ni silente aŭskultas atenteme. «Ernesto ĉeestis svislande por aĉeti, kun sia partnero Dieter, la restoracion, kiun ili nomas "Ĉe La Du Amikoj". La kunuloj multekoste pagis ĝin al la ekspozedantoj ĉikanajn. Ĉe tiu drama vespero Ernesto diris al Dieter: «Zorgu pri nia klientaro, ĉar mi rendevuas kun la gevendintoj.» Ni neniam plu revidis lin. Dieter ne sciis, kio enboate okazis sur la lago sed certas, ke oni provis mortigi Erneston.»

Alineo 11.

«Kial vi diras ... oni provis ... ?» demandas Maksimo. Arturo respondas: «Mi konservas la kontakton kun Dieter; li tre bone estras la restoracion post la malapero de Ernesto. Ekde la komenco li dubas pri la morto de sia partnero kaj certas, ke li ankoraŭ vivas. Ĉiam, kiam li iom libertempas, li serĉas la

malaperulon vizitante ĉiujn malsanulejojn de Ĝenevo al Valezo. Antaŭ unu semajno li decidis kontakti la hospitalojn de Francio sur la alia flanko de la lago. En Evian iu parolis al li pri junulo, kiu perdis la memoron kaj loĝas nun en kliniko. Ŝajnas, ke antaŭ tri monatoj la laga polico kondukis lin preskaŭ senkoncie tien. Li ne plu rememoras sian nomon kaj preskaŭ ne parolas. Dieter pretekstis ion kredindan por iri viziti lin. Li revenis tute perturbita kaj demandis al mi, kion fari?»

Alineo 12.

Ĉi-vespere Arturo proponas akompani nin ĉe Dieter, al kiu li prezentas nin dirante: «Jen Maksimo kaj Julia, tre bonaj amikoj kanadaj de Ernesto.» La restoraciestro rekonas nin kiel klientoj. Li komencas rakonti, kiel ekde tri monatoj li serĉadas sian partneron: «Finfine mi retrovis la spuron de Ernesto en kliniko de Evian. Oni ne permesis al mi renkonti la amneziulon, tamen mi bonŝance estis akceptita de lia kuracistino, al kiu mi montris la pasporton de mia partnero. La doktorino proponas, ke mi revenos post unu semajno por rehejmenigi lin, ĉar ŝi pensas, ke tio estus bona por lia terapio. Ŝi preparos por mi la diversajn elirpaperojn kaj liajn aferojn. Mi do iros morgaŭ, ĉar estas la ferma tago de la restoracio. Ĉu vi deziras akompani min?»

Alineo 13.

Dieter, Arturo, Maksimo, Julia kaj mi rendevuas en Uŝi, al la enŝipeja domo, por preni tiketojn al Evian. La kebeka paro plezuriĝas trairi la lagon kaj viziti urbon en Francio. Maksimo tutekscitas ankaŭ pri la penso revidi sian amikon. Ni ne multe parolas dum la vojaĝo, iomete angoretaj pro nekonaĵo, kiu atendas nin.

Ni alvenas al la kliniko kaj decidas atendi en la apuda trinkejo. Nur Dieter sole iras serĉi Erneston. Post preskaŭ unu horo ili ambaŭ aliras al ni. Ernesto hezite marŝas al nia direkto. Ni ekstarigās kaj salutas lin. Li alproksimiĝas rigardante ĉiun el ni unu post la alia. Li haltas sian movon vidalvide al Maksimo, kiu diras: «Saluton Ernesto, kiel vi fartas?» «Bone ... kaj vi ... Maksimo?» respondas la amneziulo ridetante. Tuj la ĝojo kaj la emocio kaptas nin ĉiujn.

Alineo 14.

La ŝipa reira vojaĝo okazas tute feliĉe. Dieter rakontas: «Antaŭ iom da tempo, kiam mi eniris la ĉambron de Ernesto, li tuj rekonis min kaj ĵetiĝis en miajn brakojn.» Tiam Arturo demandas al Ernesto: «Ĉu vi scias, kiu mi estas?» «Via vizaĝo ne estas nekonata de mi, sed mi ne plu povas rememori vian nomon.» Arturo rakontas: «Vi loĝis miahejme antaŭ aĉeti la restoracion kun Dieter.» Atentigaj ni konstatas, ke la fizionomio de Ernesto lumiĝas aŭskultante lian amikon klarigi pri tiu tempo. Maksimo prezentas sian edzinon, Julia, al la eksamneziulo. Tamen en li neniu memoraĵo restas pri lia akcidento

Alvenante en Svislandon ni ĉiuj konsentas iri kune al la policejo por anonci la revenon de “nia malaperulo”. La policisto, baze de lia pasporto, plenumas formularojn kaj diras: «Bonvenon en Svislando.»

Alineo 15.

Dieter proponas silentigi pri la reveno de Ernesto dum kelkaj tagoj. Cetere li dungis kuirhelpanton ĝis la fino de la monato; li do lasos sian kunpartneron libera, por ke li iom post iom retrovu siajn gvidmarkojn. Ĵaŭde vespere Dieter deziras organizi, en sia restoracio “Ĉe La Du Amikoj”, festeton pro la reveno de Ernesto. La kuiristo anoncas: «Escepte ni lasos la restoracion fermita al la publiko kaj ni restos inter ni ses ... amikoj.»

Dieter preparas grandiozan menuon kaj antaŭ la manĝado ekparolas: «Gekaraj. Ni festas ĉi tie la revenon ... la renaskiĝon de Ernesto. Dank'al Dio li preskaŭ tute retrovas sian memoron escepte la momentojn de la dramo. Finfine ni neniam scios, kio enboate okazis. Ne gravas. Ni lasu kun ilia sekreto la fantomojn de la lago. Je via sano!»

La Blanka Ĉevalo

Alineo 1.

«lam» -...

Alineo 2.

Ekde pluraj jaroj mi ne plu vidis tiun amikon. Ni studis kune en la sama universitato. Ni ambaŭ bonege pasis ekzamenojn pri arthistorio. Poste li decidis foriri al Kanado, kie li trovis interesan laboron. Kvankam mi restis en Eŭropo, ni ne perdis la kontakton. Li malkovris la amon kaj edziĝis tie. Nur unu fojon mi renkontis lian edzinon.

Jen alvenas la dato de ilia alveno. Kun grandega plezuro ni retroviĝas. Mi veturas ilin al mia loĝejo, kie mi havas dormĉambron por ili. Post la manĝo, mi finfine demandas al mia amiko: «Kial vi absolute deziras koni tiun restoracion?» Li respondas: «Estas longa rakonto, kiu koncernas mian onklon, kiu vivis aventuron.»

Alineo 3.

Mi do petas al Luko - tiel nomiĝas mia kebeka amiko - rakonti al mi la aferojn okazintajn al lia onklo kaj ĉefe pri restoracio, kies nomo estas "La Blanka Ĉevalo". Li komencas diri: «Mia onklo Filipino forpasis antaŭ du jaroj. Li kutime rakontis al mi, tiam infano, ke, kiam li libertempis, li ofte kutimis promeni borde de la Lemana lago kun sia hundo Lajka. Li kelkfoje haltis por manĝi aŭ kafumi en apuda restoracio. Iam li decidis sidi proksime de la fenestro. Ekstere la vetero tute malbonis kaj ĉeestis densa nebulo, kiu ne permesis vidi la alian bordon de la lago. Provante rigardi la francian flankon Filipino ekvidis tra la nebulo strangajn lumojn, kiuj moviĝis malrapide sur la surfaco de la akvo.» Subite mia amiko ĉesas rakonti, iomete emociiĝinta.

Alineo 4.

Post kelkaj sekundoj li spiras longe kaj daŭrigas: «De kiam mi junaĝis, tiu rakonto restis profunde en mia kapo. Lastatempe mi retrovis foton de mia onklo kun lia hundo antaŭ svisa kastelo kun nekonatulo. Kiam ni decidis vojaĝi al Svislando, mi parolis pri tiu stranga afero al mia edzino Klara, kiu estas ĵurnalisto kaj antaŭĝojas verki originalan artikolon por sia gazeto.» Li momente mutas atendante reagon de mi, sensukcese.

Li do daŭrigas: «Ĉu vi konsentas enketi kun mi pri tiu mistero? Ĉu vi scias ion?» Mi diras al li, ke mi iam legis strangan historion en la gazetaro. Mi pensis, ke temis pri urba legendo. Post silenta momento mi proponas al mia amiko serĉi kun li la sekreton de lia onklo. Mi pensas, ke estus amuza okupo por niaj ferioj.

Alineo 5.

Dumnokte mi pensadas pri tiu mistero. Mi serĉas en mia memoro, kiam mi legis artikolon pri tiu afero konata kiel "La Mistero de la Blanka Ĉevalo", iuj eĉ diras "La Fantomoj de la Lago". Mi perfekte scias, kie tiu hotelo situas apud la nudista strando, tamen mi neniam aliris. Oni enrete disvastigas, ke ĝi vere famas pro ege bongustaj kuirajoj, sed tiu restoracio reputacias tro multekosta laŭ la diroj de kelkaj retumantoj. La specialaĵo de la loko estas fiŝoj venantaj rekte de la fiŝkaptistoj apude. Mi promesis al miaj geamikoj inviti ilin al tiu restoracio. Mi devas ne forgesi rete rezervi tablon por kvar. Finfine mi endormiĝas revante, ke kiel Ŝerlok Holmes, mi solvos la misteron kun mia kara amiko, la Doktoro Watson ... Luko.

Alineo 6.

Post ok dormhoroj mi vekigās sufiĉe ripozita kaj lasas mian edzinon ankoraŭ dormi. Mi scivolemas enketi pri la mistero serĉante en mia komputilo. Mi trovas la retejon de la restoracio. Mi do vokas por rezervi tablon kaj demandas ankaŭ, ĉu eblas sidi vidalvide de la lago.

Dumtage ni vizitas la belegan regionon de "Lavaux", Monda Hereda Posedaĵo de Unesco. Vesperkomence ni alvenas al la fama restoracio sufiĉe frue por kviete ĝui la belan lumon de la sunsubiro kaj kompreneble aperitivi trinkante botelon de "Dézaley". Klara komencas skribi ion pri nia fantoma enketo. Mi konsultas la menuon kaj tre surprizita mi legas ĝian specialaĵon: "Fiŝo ornamita per delikata fitoplanktona saŭco". Kurioze! Ĝi tentas nin provi. Kial ne?

Alineo 7.

Flanke de nia tablo sidas paro, kiu laŭte rakontas: «Ĉu vi rememoras la misteron de la Kasteleto de Glerolo ... datita de preskaŭ dudek jaroj?» demandas la virino al la viro, kiu respondas: «Ha, jes, pri la morto de la gekastelana filino, kiu dronis en la lago. Oni neniam retrovis ŝian korpon. Ŝiaj gepatroj mortis ses monatojn poste pro ĉagreno.» Ĉu tiuj du personoj aŭdis nin paroli pri la afero de la onklo de Luko? Ni kvar diskrete aŭskultas. La virino daŭrigas: «Ŝajnas, ke oni vidis ŝian fantomon marŝi surakve, eĉ pli, ke la "Blanka Damo" hantas la kastelon. Ĉu vi kredas, ke ni bonŝance vidos ŝin aŭ ĝin ĉivespere?» «Ne nur la skotoj rajtas havi fantomojn, ĉu ne?» diras la viro ridante. Ili stariĝas kaj eliras salutante nin amuzitaj.

Alineo 8.

Ankaŭ du viroj ĉe apuda tablo aŭskultis la paroladon de la paro. Ili alparolas niajn gekebekanojn: «Tio, kion ili rakontis, tute veras. Ni tuj konstatis, ke vi estas turistoj. Mi mem plezuregas aŭdi vian kanadan akĉenton. Vidu, en nia regiono aperas misteraj aferoj. La "Blanka Damo" estas unu el multaj. Ni speciale bone konas tiun ĉi. Ni ambaŭ laboras kiel profesiaj plongistoj. Siatempe la polico petis nin mergiĝi por serĉi la korpon de la fraŭlino ... sensukcese.» Ĉimomente la kuiristo alvenas en la salonon por bonvenigi la klientojn. La du viroj daŭrigas rakonti: «Ni pensas, ke ŝia fantomo profunde loĝas enkaverne ĵus sub la kastelo. La nova kastelano, la frato de la "Blanka Damo", frenezigiĝis kaj longe serĉis sian fratinnon per lumĵetilo.»

Alineo 9.

La ĉefkuiristo alproksimiĝas de nia tablo: «Ĉu enordas kaj ĉu la menuo plaĉis al vi? Mi volonte ofertas al vi digestigaĵon lokan ... » Niaj geamikoj volas testi ĝin sed mia edzino kaj mi mendas nur kafon. Unu el la plongistoj intervenas: «Demandu al li, ĉu nia historio veras aŭ ne? » La kuiristo komencas: «Jes veras. Ses monatoj antaŭe, mi mem estis atestanto pri io bizara, kiam fine de mia laboro mi ŝlisis la kuirejon ... en nigra nokto ... mi rimarkis blankan formon homan, kiu surakve, tute senbrue, moviĝis al la direkto de la kastelo. Bloveto freŝigis mian dorson. La "Blanka Damo" altiĝis ĝis la tria etaĝo kaj tramuren malaperis. Nur restis kelksekunde blua flamo malantaŭ ŝi. Mi certigas, ke estas la vero. Cetere mi konas personojn, kiuj vidis la saman strangaĵon.»

Alineo 10.

Rehejmenigante Klara anoncas: «Pli kaj pli tiu aferego interesas min. Mi absolute volas verki libron pri la mistero de la "Blanka Damo". Morgaŭ ni povus enketi renkontante la kastelanon.» Luko respondas: «Tro danĝeras. Ĉu vi aŭdis, ke la frato frenezigiĝis?». Mia edzino rifuzas iri. Klara estas tute decidita kaj argumentas, ke kiel ĵurnalistino ŝi iafoje bezonas riski por trovi solvon.

Sekvatage ni tri ĉeestas proksime de la kastelo. Luko ekdiras: «Jes ĝi aperas sur la foto de mia onklo.» Ni sonorigas ĉe la pordego de la kastelo. Ĉefservisto venas malfermi ĝin demandante: «Kion mi povas fari por vi?» Tuj Klara respondas: «Saluton. Mi estas kanada ĵurnalisto», montrante sian profesion karton. «Mi enketas pri la historio de kasteloj svisaj de tiu regiono. Mi deziras intervjui Sinjoron Kastelestron».

Alineo 11.

La ĉefservisto anoncas, ke lia Mastro ne ĉeestas tiumomente kaj proponas al ni reveni morgaŭ. Klara dankas kaj ni foriras, salutante lin. Ŝi havas alian ideon: «Ni devus lui ĉambrojn en la restoracio-hotelo kaj observi, ĉu okazos io dumnokte.» Ĉiuj el ni konsentas. Mi telefone informas mian edzinon.

Je la noktomezo Luko, kiu de duonhoro observas trafenestre, krias al ni: «Venu, mi ekvidas ion.» Surakve ni povas vidi lumon, kiu alproksimiĝas al la bordo. Tuj ni decidas eksteriri senbrue por pli bone observi. Ni kaŝas nin malantaŭ arbojn kaj vidas la lumon bluan preskaŭ kiel junulinan formon. Ĉu estas nia imago, kiu kreas bildon de la “Blanka Damo”? La aperaĵo moviĝas, aliras malrapide kaj ondante, ĉirkaŭita de blua lumo. Ni kaŝe sekvas ĝin.

Alineo 12.

Ĝi aŭ ŝi flugas super la strando kaj alvenas pli kaj pli al la kastela haveneto. Subite el la kontraŭa flanko de la konstruaĵo aperas du aliaj similaj formoj, proksimiĝantaj al la “Blanka Damo”. La tri restas tiel grupe kelksekunde antaŭ trairi la kastelmuron je la dua etaĝo kaj malaperas. Ni atendas momentege ... silente esperante ankoraŭ ion ... sensukcese. Ni tre kviete revenas al nia hotelo sen paroli.

En la ĉambro de Luko ni interŝanĝas: «Nun ni certas, ke ni ne revis. La “Blanka Damo” vere ekzistas. La popola legendo veras», diras Klara. Luko daŭrigas: «Mi estas trankviligita; mia onklo pravis kaj vivis la saman sperton.» Klara kiel ĵurnalistino tute ekscitiĝas: «Morgaŭ ni scios la solvon de tiu mistero.»

Alineo 13.

Ni, la “tri enketistoj”, resonorigas ĉe la kastelpordego. Kiel hieraŭ, la ĉefservisto bonvenigas nin. Nun li diras: «Mia Mastro atendas vin, bonvolu sekvi min.» Li kondukas nin en grandegan antaŭĉambrojn kaj foriras. Klara tuj ekparolas: «Lasu min ludi mian ĵurnalistan rolon.» Luko, timema, respondas: «Jes prave, ni nur aŭskultos.» La pordo brue malfermiĝas malrapide kaj aperas viro sesdekjara, kun blanka kaj longa hararo, rondaj okulvitroj nigraj, vestita de rajdaj pantalono kaj botoj. «Bonvenon en mia kastelo, posedaĵo de nia familio ekde 161Alineo 2. Mi prezentas min: Grafo Mikaelo de Glerolo. Kion mi povas fari por vi?» Klara komencas: «Mi estas kanada ĵurnalisto. Mi enketas pri svisaj kasteloj.» Ŝi montras la foton al la grafo: «Ĉu tiu estas via kastelo?»

Alineo 14.

Li prenas enmane la foton kaj palpebrumante li snobe deklaras: «Bonvolu pardoni min, mi devas ŝanĝi miajn okulvitrojn.» Li viŝas ilin kaj plu rigardas: «Jes, veras, estas mia kastelo antaŭ dudekjaroj. Mi rekonas ankaŭ tre bonan amikon, pri kies nomo ... mi ne plu bone memoras.» «...Filipo kun sia hundo Lajka», laŭte ekkrias Luko kontenta esprimi sin. Subite la grafo levas la okulojn al ni kaj re-normaliĝas el sia esprimmaniero tute emociita: «Kiel vi scias tion?» Luko ekrespondas: «Estas mia onklo, la frato de mia patrino.» Post silento la grafo rerigardas la foton. «Filipo estis por mi amiko tre fidela. Post la malapero de mia fratino kaj la morto de miaj

gepatroj mi imagis ne plu povi vivi post tiu grandega ĉagreno. Filipino ĉiam miaflanke ĉeestis por subteni min.» Nia grafo diskrete sekigas siajn okulojn.

Alineo 15.

Ni estas invititaj sidiĝi en granda salono. La kastelmastro proponas al ni kunmanĝi kaj, sen atendi nian jeson, mendas al la ĉefservisto servi aperitivojn. «Estas tre granda honoro kaj plezuro ricevi en mia hejmo familianojn de Filipino. La informo de la malapero de mia kara amiko remergigas min en doloran tempon kaj samtempe feliĉegan epokon kun li. Tre ofte Filipino pasigis libertagojn enkaŝtele kaj iam, kiam li ĉeestis, la restoraciestro venis peti la permeson lumigi la kastelon por valorigi ĝin. Plie la estro ankaŭ ofertis lumajn projekciaĵojn surlage por lia klientaro.

Nun estas mia filo, kiu posedas la “Blankan Ĉevalon”. Li pli bonigis la “spektaklon” pere de holografiaj teknikoj. Hodiaŭ lia restoracio tre tre famas tutmonde pro la fantomoj de la lago.»

La Blanka Kruco

Alineo 1.

«lam» - ...

Alineo 2.

Antaŭ kvar jaroj mi amikiĝis kun Francisko, kiam mi iris al Kebekio. Surloke mi aliĝis al fiŝkaptada semajno, al kiu li ankaŭ partoprenis. Mi tuj konstatis, ke lin pasias fiŝkaptado. Li impresis min, ĉar li konas la nomojn de ĉiuj fiŝoj kaj bonege instruis min pri la danĝeroj de la maroj, la misteroj de la riveroj kaj de la lagoj, pri iliaj flaŭro kaj faŭno. Por mi la fiŝkaptado estas trankvila aktiveco. Sed pere de mia amiko mi ankoraŭ pli perfektigas mian manieron fiŝkapti.

Krom fiŝkaptado li ŝoforis min al multaj vidindaĵoj de lia regiono kaj invitis min en la plej bonaj restoracioj.

Tiutempe, li kaj mi estis fraŭloj. Lastjare li edziĝis. Mi do ne ankoraŭ konas lian edzinon. Li baldaŭ alvenos svislanden por prezenti ŝin al mi.

Alineo 3.

Je la difinita horo ili surteriĝas Ĝeneven; mi bonvenigas ilin kun granda ĝojo. Ridante, Francisko kaj mi brakumas nin. Poste li prezentas al mi sian edzinon: «Jen Ĵozefina, mia blondulino, kiel oni diras en Kebekio.» Juna virino kun longaj nigraj haroj subite kisas min: «Saluton Marko, mi feliĉas finfine renkonti vin. Nomu min Ĵozi, mi petas.»

Mi veturigas ilin al mia domo. Mi loĝas en vilaĝo inter urbo kaj montaro. En mia vilao mi preparas ĉambron por miaj gastoj. Post ilia instalaĵo kaj iomete da ripozo ni kunvenas por manĝi. Por pli bone koni Ĵozin mi demandas al ŝi, ĉu ŝi ankaŭ ŝatas fiŝkapti. Kun mistera rideto ŝi diras: «Mi preferas naĝi subakve kune kun la fiŝoj kaj malkovri la profundaĵojn.»

Alineo 4.

Dum la manĝo ni parolas pri la projektoj por la venontaj tagoj. Mi sugestas malkovri lokojn borde de la lago, kie mia amiko kaj mi povos fiŝkapti dum, Ĵozi esploras ruinojn funde de la lago.

Je la morgaŭo, frumatene, ni veturas al mia ŝatata strando. En ĉi tiu loko, dum la tuta tago, mia amiko fiŝkaptas multe da fiŝoj kaj mi male nenium. Kiam Ĵozi desubakve revenas, ŝi tre feliĉas kaj rakontas al ni, ke ŝi malkovris plurajn antikvajn amforojn. Mi tuj diras al ŝi: «Danĝeras alproksimiĝi de ili.» Ridante, mi klarigas pri malnovaj legendoj, kiuj rakontas, ke fantomoj de la lago loĝas en tiuj ujoj. Tuj ŝi ekridas. Male mia amiko subite silentas kaj paliĝas.

Alineo 5.

«Ĉu ĉio enordas?» mi demandas al li. Li kapjesas. Ĵozi maltrankvila proponas iri trinki ion en la apuda trinkejo. Francisko kaj lia edzino sidiĝas fronte al mi. Mia amiko solene ekparolas: «Mi volas klarigi al vi ambaŭ pri io, kion mi neniam diris al iu, ion, kion mia patrino rakontis al mi ĵus antaŭ morti.» Ĵozi rigardas sian edzon tute mirigita. «Ĵus post la dua mondmilito mia patrino avo, malmultekoste, aĉetis restoracion nomante ĝin kiel ofte en Svislando "la Blanka Kruco". La konstruaĵo servis, dum la 18-a jarcento, kiel monaĥejo. Cele al renovigo de la restoracia kelo, mia avo malkovris, malantaŭ granda muro, du skeletojn meze de amforoj plenaj de malnovaj oraj moneroj.»

Alineo 6.

Francisko daŭrigas sian rakonton dirante: «Mia avo ankoraŭ samloke malkovris antikvan libreton, mane skribita en la latina, kiu troviĝis en ligna kesteto apud la kadavroj. Bonŝance mia avo scipovis kompreni la malnovajn lingvojn. Li trapasis la tutan nokton deĉifrance ĝin. La malgranda libro rakontas, ke - en la romia epoko - multaj barkoj vojaĝis surlage. Unu el ili - ŝipo de la impostkolektisto - dronis pro

tempesto ne fore de la monaĥejo.» Mia amiko daŭrigis la rakonton: «En la jaro 1789 Frato Jakobo promenante surstrande malkovris, meze de la ŝtonoj, objekteton flavan. Li rapide purigis ĝin kaj subite komprenis, ke tiu ora monero, kun la visaĝo de la roma imperiestro, venas el la malbenita ŝipo, pri kiu oni parolas en la regiono. La monaĥo krucoŝignis dankante la ĉielon pro tiu dia donaco.»

Alineo 7.

Mi scivoleme demandas: «Kiu skribis tiun latinan libron?» Francisko certigas, ke eĉ sia patrino ne sciis, klarigante: «Neniam ... neniu enfamilie vidis tiun libron.» Mia amiko aldiris, ke bedaŭrinde li mem ne konis sian patrinan avon, kiu mortis antaŭ lia naskiĝo. Kiam li sepjaraĝis, lia gepatra familio formigris al Kanado. «Mi mem pensas, ke eble la libreto estis farita la monaĥo mem, kiu konsciencie decidis skribi ĉion, kio okazis tagon post tago.» Francisko daŭrigas la rakonton: «luvespere du vilaĝaninoj ekvidis la monaĥon serĉi ion borde de la lago. Ili alproksimiĝis kaj demandis al li, ĉu ili povas helpi lin serĉi. Tio estis la lasta frazo skribita en la libro. La rakonto tiel ĉesis tie; la teksto finis meze de paĝo, meze de la eta libro.»

Alineo 8.

Mi demandas nekredante: «Ĉu vi certas, ke ĉi tiu rakonto veras? Ĉu nure via patrino sciis tiun familian sekreton? Ĉu neniu scias, kien malaperis la libro?» Hezitante Francisko respondis: «Mi mem ne certas kredi tiun aferon; mi pro tio ĉeestas svislande por klarigi la aferon.»

Ĵozi anoncas, ke ŝi lacas kaj ke ŝi deziras rehejmeniri. Elirante la trinkejon ni decidis marŝi laŭ la strando ĝis la aŭto. Mi proponas: «Ni iru morgaŭ al la oficejo de la arkivoj por serĉadi tiuepokajn tekstojn pri la monaĥejo kaj ankaŭ pri la restoracio “La Blanka Kruco”, kiam via avo estis posedanto. Ni eble trovos dokumentojn pri la diversaj laboraĵoj en la restoracia kelo, eble polica raporto.» Subite la vento ekblovas kaj fulmotondroj aperas fore tra la nokto. En la ventaj bruoj ni aŭdetas tre mallaŭtajn ploradojn kiel fantomaj.

Alineo 9.

Kio estas? Ni tuj haltas kaj silentas. Ni staras senmove kaj maltrankvilege restas kiel ŝtonigitaj. Mi mem sentas tremon laŭlonge de mia dorso. Fine la bruo ĉesas. Ni momente atentigas kaj atendas aŭskultante ankoraŭ senmove. Subite nova fulmotondro eksplodas eksaltigante nin. Reaŭdeblas la ploraĉoj, ne rekonebla sono stranga, malbonaŭgure. Ni tre malrapide sed kuraĝe provas alproksimiĝi al la direkto de ĝi. Ĵozi kaptas la manon de Francisko kaj rigardas min por trovi kuraĝon. Subarbe ni ekvidas brili du okulojn, kiuj observas nin tute fiksitaj. Nova fulmo zigzagas tra la ĉielo kun terura tondrego. Tuj ni ekvidas la okulojn de kato, kiu subite saltas kun korŝira krio kaj forfuĝas el malantaŭ arbeto. Ni tri ekridegas pri nia sensenca angoro.

Alineo 10.

La tri enketistoj - kiuj ni estas - ĵus alvenas akurate por la malfermo de la arkivejo. Ni petas al la deĵoranto konsulti gazetojn kaj raportojn pri la restoracio “La Blanka Kruco”. Post kelkaj minutoj la oficisto alportas al ni tri pezajn librojn datitajn de la kvindekaj jaroj. Ĵozi serĉas en unu kaj Francisko en alia. Mi mem decidis legi ĉiujn administrajn raportojn nome de la avo de mia amiko kaj koncerne la permesiloj senditaj al la posedanto de la restoracio. Mi malkovras, ke li deziris krei spektaklan salonon en la kelo por organizi distrajn vesperojn kun lokaj aktoroj kaj kantistoj. La estro deziris modifi la lokon por ludigi teatrajn pecojn pri legendoj de la regiono. Koncerne Francisko li malkovris gazetan artikolon pri la inaŭguro de “La Teatra Kelo en La Blanka Kruco”.

Alineo 11.

«Ĉi tie, oni parolas pri strangaj eventoj dum la inaŭguro». Francisko legas : «La teatraĵo rakontis la legendon de la malnova monaĥejo kaj la eltrovon de trezoro. La muzikistoj interpretis mezepokan pecon. Sceneje aperis, portanta libreton kaj maskon de diablo, monaĥo parolanta la latinan. Ĉirkaŭ li dancis du aktorinoj kun loka ĉapelo kaj « vestitaj » kiel skeletoj. La lumo trapasis tiujn strangajn aĵojn. La religiulo leviĝis en la aeron kaj de sub sia talaro disfalis orajn monerojn. La muziko ĉesis kaj fantomaj kriaĵoj disŝiris la silenton. Kelkajn sekundetojn poste la aĵoj dissolviĝis en la plafono. La publiko restis ŝtonigita minuteton antaŭ ege aplaŭdi.» Ĵozi malkovris ion: «En tiu alia artikolo oni parolas pri la malkovro en la kelo ĵus dum la renovigo...»

Alineo 12.

En tiu alia teksto, la ĵurnalisto parolas pri la nova posedanto de la restoracio “la Blanka Kruco” ... «Ili parolas pri mia avo» ekdiras Francisko. Ĵozi daŭrigas legante: «La nova gastejestro ricevis la permesilon renovigi la kelon de sia nova posedaĵo, regione konata kiel antikva monaĥejo ĝis fine de la 19-a jarcento. Dum la laboraĵoj la metiistoj faligis muron kaj troviĝis vidalvide al truo je preskaŭ 2 metroj alta, kiu kaŝis du skeletojn, tri amforojn plenajn da oraj moneroj romiaj kaj libreton mane skribitan en la latina lingvo. La polico enketis; la fakuloj - post teknikaj ekzamenoj - certigis, ke enmure ĉeestis du virinaj sekaj korpoj. La libreto estas komisiita al tradukisto kaj la amforoj kun moneroj konfeditaj al la loka muzeo.»

Alineo 13.

Mi invitas miajn gevizitantojn tagmanĝi en la muzea restoracio kaj testi fonduon duonduonan. Francisko tuj ekĝojas: «Mia patrino multe parolis al mi pri tiu specialaĵo preparita en la restoracio de mia avo ... grujero kaj friburga fromaĝo nomita “Vacherin”_» La estro ofertas al ni meztempan brandan trinkaĵon: kirŝglaseton.

Alvenante al la muzea akceptejo ni demandas, en kiu parto troviĝas la informoj pri “la afero de La Blanka Kruco”. La deĵorantino tuj respondas : «Salono kvin, en la historia sektoro, proksime de la monaĥejaĵaj dokumentoj.» Kvin amforoj staras apud montroŝrankoj en kiuj oni povas vidi la kolekton de moneroj romiaj, la “nian” libreton kaj bildojn, kie oni vidas la avon de Francisko fotita apud la truo kun tiu komento: «La posedanto de la restoracio “La Blanka Kruco”, kiu trovis trezoron en sia kelo.»

Alineo 14.

Tre emociita Francisko rigardas la visaĝon de sia avo kaj la libreton malfermitan je la lasta manskribita paĝo. Apude kuŝas ĵurnalon tieepokan, kiu rakontas la historion pri la skeletoj. Ĵozi legas : « Oni retrovis en la arkivaj tekstoj de la monaĥejo, ke religiulo nomita Frato Jakobo, sur sia mortlito, konfesis, ke «li ofertis la Paradizon» al du virinoj alcele gardi sekrete la dian donacegon. Post la morto de Frato Jakobo, la monaĥejestro ricevis de la episkopo ordonon kaŝi ĉion por ĉiam, ĉar neniu sciis, de kie alvenis tiu amaso da oro.» Fine de la vizito, Francisko sugestas iri peti al la restoraciestro permeson viziti la kelon de la antikva monaĥejo. Hodiaŭ la restoracio ne plu nomiĝas “La Blanka Kruco” sed “La Pregoĵejo”.

Alineo 15.

Ni rakontas nian sperton al la maljuna gastejestro, kiu tuj ekkrias: «Mi bonege konis vian avon. Mi laboris kiel kuiristo en “La Blanka Kruco” kaj fine aĉetis al li tiun konstruaĵon. Bedaŭrinde mi ne bonŝancis koni la epokon de la spektakloj en la kelo. Multaj diris, ke estis grandiozaj spektakloj.» «Ĉu ni povas viziti ĝin?» demandas Francisko.

Ni tre profunde malsupreniras en “la fama teatro de la Blanka Kruco”. Ene ĉeestas nenio plu ol bareloj kaj rezervaĵoj por la restoracio. «Mi kredas, ke estis tiu muro, kiu tiom preparoligis dum multaj jaroj» diras la estro. «Nun, novaj amikoj miaj, mi invitas vin manĝi mian kuiriaĵon; vi diros al mi vian opinion pri mia speciala svisa manĝo. Plie ni trinkos mian vinon kaj tostos memore al via kara avo kaj liaj fantomoj de la lago.»

La Granda Ursino

Alineo 1.

«lam...» - ...

Alineo 2.

Jen la feliĉa tago de ilia alveno. Mi tre ĝojas renkonti Rikardon kaj lian edzinon, Berta, kiu estas tre ĉarma virino. Dum la veturado mia amiko demandas al mi, kiam ni iros al la restoracio, pri kiu li parolis. Mi proponas la morgaŭon. Mi kondukas ilin miahejmen kaj pretigas vespermanĝon. Dum tiu tempo ni organizas la morgaŭan vojaĝon matenfine: «Ni tagmanĝos en la dezirata restoracio», li diras. Dum la diskutado mi finfine komprenas, ke ili loĝos poste en malnova hotelo apud tiu restoracio, gastejo, kiu havas kelkajn ĉambrojn. La edzino ŝajnas ne tre entuziasma je tiu ideo, male de la edzo, kiu vere senpacienas alveni tien. Li pretigas fotoaparaton, kiu havas multe da akcesoraĵoj, ekzemple por foti dum la nokto.

Alineo 3.

La sinteno de mia amiko ŝajnas sufiĉe mistera. Mi ne volas ŝajni tro scivolema kaj mi diras al mi mem, ke morgaŭ mi scios pli. Nia vespermanĝo okazas feliĉe en la ĝojo de reunuiĝo. Ni elvokas, kompreneble, mil memoraĵojn kaj ni havas multajn rakontojn por babili. Ni lastfoje vidis nin en Kanado antaŭ du jaroj. La vespero daŭrigas per iuj alkoholaj trinkaĵoj, ... kiuj eĉ ne malstreĉas la langon de mia amiko. Tre malfruas, kiam ni enlitiĝas. Mi demandas al mi, ĉu ni povos ellitiĝi tiel frue, kiel esperite.

La abunda manĝo kaj alkoholaĵoj ĝenas mian endormiĝon. Mi turnas kaj returnas min enlite. Aŭ ĉu estas ĉi tiu mistera etoso, kiun mi forte sentas kaj kiu eble perturbas min?

Alineo 4.

La nokto mallongas. Miaj okuloj ankoraŭ plenas je nebulo, kiam mi ellitiĝas. Mi kiel fantomo transiras malrapide la koridoron, eniras la kuirejon malhelan, malestingas la lumon kaj enŝaltas la kafaŝinon. Subite mi eksaltas pro granda bruoj kaj tute ekvekita serĉas, kio okazis. Mi konkludas, ke mia ĉambropordo ekbatis pro trablovo. Ĉu tiu bato ĉiujn vekis ?

Postminute alvenas Rikardo: «Bonan matenon», li respondas ĝentile al mia saluto. Sed mi perceptis iom da malbonhumoro en li kaj mi tuj pardonpetas: «Estas mi la kulpulo, kiu forgesis fermi la pordon de mia ĉambro, pardonu min.» «Ne problemas, mi jam estis vekita kaj Berta ankoraŭ dormas.» La kafo pretas kaj ni sidiĝas kune ĉetablen. Postmomente Rikardo komencas rakonti al mi, kial li “absolute” volas iri dormi en tiun gastejon.

Alineo 5.

«Kiam mi infanaĝis, mi ricevis kristnaske libron, kiu rakontas la historion de knabo svisa, kiu venas fiŝkapti borde de la lago kun sia hundeto “Patsi”.» Apud li fiŝkaptis ankaŭ maljunulo, kun kiu li amikiĝis. Ni lernas laŭ la rakonto, ke la maljunulo loĝis apude en malnova hotelo nomita “La Granda Ursino”.» Ĝus envenas en la kuirejo Berta, kiu salutas nin dirante, ke delonge Rikardo deziras veni Eŭropon por dormi en tiu hotelo. Li daŭrigas: «La maljunulo parolas al la knabo pri fantomoj, kiuj promenas ĉiunoktomeze inter la hotelo kaj la lago ... montrante al la junulo la strandon kaj la arbojn. Li klarigas, ke tra lia hotela fenestro, li vidis ilin promeni senbrue kaj alfine foriri en la akvon.» Mi restas ege surprizita pri tiu porinfana rakonto.

Alineo 6.

Iom post iom la ekscito aventuri kreskas en mi. Mi asertas: «Se vi deziras vidi tiujn fantomojn, vi devos atendi la nokton. Mi do komprenas, kial vi jam rezervis ĉambron en tiu hotelo por vi ambaŭ...» Vidante mian visaĝon desapontitan, Rikardo ridetas kaj respondas: «Ne zorgu, kara amiko, mi rezervis ankaŭ ĉambron por vi.» Nekredeble. Mia amiko vere scias konsevi misterojn kaj surprizi min.

Ni do preparas niajn aferojn kaj veturile foriras. Dum la tuta vojaĝo la etoso gajas. Duonhore poste ni surloken alvenas fronte al malfermita portalego. Post mallonga vojo ni malkovras la hotelon. Ĝi estas malnova kaj en trista stato. En la akceptejo sinjoro, kun malhela vizaĝo, montras al ni niajn ĉambrojn, kiuj tute ne similas al palaco.

Alineo 7.

La mebloj estas malnovaj, senvaloraj kaj la aero mucidas. Ni rigardas nin neridante kun surprizitaj vizaĝoj. La hotelo tute ne plaĉas al mi, tamen por mia amiko tiu celo gravas. Certe ja kiel mendite oni kondukas nin al ĉambroj kun vidaĵo al la lago. Sed bedaŭrinde kelkaj grandaj arboj staras en la parko inter ni kaj la bordo de la lago. Do la vidaĵo iomete malvastas. Finfine, post la insistado de Rikardo, ni akceptas tiujn loĝejojn. Ni instalas nin en la ĉambroj kaj konsentas rendevui en la hotela salono por elekti la posttagmezan programon.

Post kelkaj minutoj ni tri estas denove kune. Ni tuje eksteriĝas por spiri puran aeron. Post diskuteto ni decidis viziti la fiŝkaptistan vilaĝeton kaj poste vespermanĝi en loka gastejo pli agraba por momente forgesi la etoson de nia hotelaĉo.

Alineo 8.

Havante sufiĉe da tempo, ni decidis malkovri la havenon proksime. Surkaje la fiŝkaptistoj pretigas sian kaptilon. Unu el ili, maljuna, signas al ni alproksimiĝi por montri sian belan fiŝegon. «Ĝi nomiĝas “ezokon”», li diras. «Mi bone konas ĝin, respondas Rikardo rakontante, ke en libro legita infanaĝe oni multe parolas pri tiuj fiŝoj, kiel la ezokoj kaj la siluroj kaptitaj de la du amikoj, la maljunulo kaj la knabo kun sia hundeto “Patsi”.» Aŭdante la nomon de la hundo, tuj la fiŝkaptisto levas siajn okulojn al ni. Rikardo daŭrigas dirante: «Tiu amikeca historio ege impresis min.» Tiam la vizaĝo de la fiŝkaptisto lumiĝas; emociata, li viŝas per sia dektra mandorso siajn malsekajn okulojn kaj diras: «La knabo de via rakonto estas mi ... »

Alineo 9.

La silento invitigas inter ni kvar. Rikardo estas multe mirigata pri la ŝanco ofertata al ni. Li tute mutas rigardante tiun homon, kiu de lia infanaĝo longe vivas en lia memoro. Finfine la fiŝkaptisto diras: «Mi nomiĝas Gilberto kaj loĝas en la apuda vilaĝo.» Li proponas, ke ni iru al lia hejmo por aperitivi. Ni sekvas lin marŝante kvindek metrojn, kiam kuris al ni lia hundo “Perlo”. Elvenas, tra la malfermita pordo, lia edzino: «Mi prezentas al vi Terezan.» Poste Gilberto proponas sidiĝi ĉirkaŭ la tablo antaŭ ilia dometo. La fiŝkaptisto montras al ni la apudan domon de la aŭtoro de la libro: «Francis Gauthier estis fama verkisto pri infanlibroj.»

Alineo 10.

Gilberto tre fieras scii, ke pro tiu libro gekebekanoj decidis veni viziti Svislandon. Li klarigas: «Kiam mi knabaĝis, ĉiutage mi iris fiŝkapti kun Francis. Jes la rakonto veras. Ni rapide amikiĝis kaj mi ŝatis aŭdi lin imagi historietojn pri la lago. Li priskribis kreaĵojn mitologiajn, kiuj prenas formon de drako aŭ flugila serpento. Aŭ arbaraj koboldoj, kiuj elmontare falis en la akvon kaj, ne sciante naĝi, dronis en la lago.» Gilberto plezuras feliĉigi siajn gastojn; Rikardo aŭskultas atente. Lia edzino demandas: «Kaj pri la fantomoj, ĉu vi iam vidis ilin?» Gilberto pripensas

momenteton kaj diras: «Unufoje Francis invitis min observi la fantomojn apud la hotelo. Subite li flustris al mi ... rigardu ... jen la animoj de la elfoj, kiuj ellage revenas promenadi.»

Alineo 11.

Aŭdante la rakonton de la fiŝisto ni ĉiuj silentas. Fine Rikardo rigardas sian edzinon, kiel por diri: «Vi aŭdas, ke la fantomoj ekzistas...» kaj li ankoraŭ volas scii: «Ĉu poste vi revidis la animojn de la elfoj reveni apud la hotelon?» Gilberto respondas, ke neniam plu li revidis la fantomojn. Postmomente Tereza demandas al mia amiko: «Kial vi interesiĝas pri fantomoj?» Rikardo kiel infaneto iomete ruĝiĝas kaj respondas: «De ĉiam la strangaĵoj interesas min kaj dum mia knabaĝo mi multe legis librojn kiel “La fantomo de la operejo” kaj spektis ĉiujn filmojn de aperaĵoj bizaraj.» Gilberto daŭrigas: «Ĉu vi mem iam vidis verajn fantomojn? Mi esperas, ke vi bonŝancos ĉi-nokte en la hotelo.»

Alineo 12.

Jam estas la horo vespermanĝi. Feliĉega estas Rikardo, kiu ĉi tie retrovas sian infanecan emocion; li brakumas Gilberton, surprizita. Ni dankegas kaj adiaŭas niajn gastigantojn. Kiam la kelnero alportas la aperitivojn, Rikardo demandas al li pri la legendo: «Ha jes ... la fantomoj ... klare, ke ili ekzistas. Dank’ al Francis Gauthier nia vilaĝo famas kaj li alvenigas detutmonde plenplenajn busojn da turistoj; la verkisto meritis statuon sur la placo.» Estas amuze, ke mi mem ĵus hodiaŭ malkovras tiun verkiston. Mi pensas, ke ni bonŝancos ĉi-nokte ĉar la luno plenas.

Poste ni forlasas la restoracion por marŝi “senplezure” ĝis nia hotelaĉo. La pala lunlumo reflektiĝas sur la tute kvietaj lago. Aŭdiĝas nur niaj paŝoj en la gruzo.

Alineo 13.

Ni eniras la hotelon kaj aliras rekte al niaj ĉambroj. En la mia bonŝance la lito estas komforta kaj mi ekdormas senprobleme. Pli malpli post noktomezo mi vekigatas tute ŝvita. La varmo estas ne eltenebla. Mi ellitiĝas por kontroli la hejtilon; ĝi estas malvarma. Mi iras trinki kaj freŝigi mian visaĝon en la banĉambro. Mi ne komprenas, kial io maltrankviligas min. Mi momentete ĉesas spiri por aŭskulti. Mallaŭta bruo grimpas el la suba etaĝo. Mi nervoze tremas malfermante mian ĉambran pordon. La bruo similas kiel voĉoj fluŝrantaj. Mi ekvidas ombrojn en la nigra koridoro. Poste malhelaj lumoj promenadas sur antikvaj portretoj kroĉitaj kontraŭ la ligna muro. Raŭkaj krioj kaj ploroj pli kaj pli laŭte aŭdeblas. Subite ĉio haltas kaj la silento envadas la koridoron. Nenio plu. Mi decidas reenĉambriĝi.

Alineo 14.

Malfacilas al mi trovi la dormon. Longtempe mi povas reaŭdi la bruojn, kiuj ne plu alvenas. La silento ĉeestas kaj nur la ligno krakas. Finfine mi reiras en miajn revojn. Je la naŭa, kiel decidite, sametaĝe mi renkontas Rikardon kaj Bertan tute timemaj. Ili klarigas al mi, ke ili ne povis dormi aŭdante bizaran bruon dum la tuta nokto. Kiam ni alvenas al la akceptejo por pagi, la deĵoranto diras al ni: «Mi dankas vin, ke vi elektis nian hantatan hotelon. Mi esperas, ke vi plezuris renkonti niajn fantomojn. Revenu, kiam vi deziros», ofertante prospekton al ni tri. Ekster la hotelo mi legas: “La plej fama hotelo, en kiu kaŝiĝas veraj fantomoj”. Tute surprizita mi montras la paperon al miaj amikoj kaj kune ni samtempe ekridegas.

Alineo 15.

Ni decidas, ke post la matenmanĝo en la proksima restoracio ni iros viziti “la domon de Francis Gauthier”, kiu estas aktuale muzeo pri la vivo kaj verkaro de la aŭtoro.

Ni teretaĝen alvenas en la butikon; ni solas en la domo. Sinjoro proponas gvidi nin tra la diversaj salonoj: «Bonvenon en la domo de Francis Gauthier, mia patro.» Rikardo rigardas lin tre impresata. La gvidisto vizitigas al ni la diversajn lokojn kaj subite demandas: «Kiel vi aŭdis pri tiu muzeo?» Tiam Rikardo rakontas la legadon infanaĝe de sia libro: «Post multe da jaroj ĝi bedaŭrinde foriĝis; mi neniam plu retrovis ĝin kaj eĉ... mi ne plu rememoras ĝian titolon.» Sinjoro Gauthier iras preni ekzempleron sur la bretaro dirante: «Estas donaco por vi; ĝia titolo estas "La Fantomoj de la lago".»

Fino

Verkintoj

Charlotte Blanc Maillard

Pierre Boizot

Perine Bonjour

Gilbert Darbellay

Denis Maret

François Randin

Elisabeth Renaud

Cléa Robin

Markus Sanz

Rosario Scopelliti

Knud Sunier

Marie-Antoinette Sunier

Paulette Weyeneth

kun la helpo de Nancy Fontannaz